Dediĉa Ceremonio

Ni dediĉas tiun lokon al la Tri Juveloj:
al la Budho, la idealo pri Vekiĝo, al kiu ni aspiras,
al la Dharmo, la vojo de la Instruo, kiun ni sekvas,
al la Sangho, la spirita kamaradeco, kiun ni ĝuas.

Neniu malutila vorto estu tie ĉi esprimata.
Neniu maltrankvila pensaĵo ĝenu tie ĉi niajn mensojn.

Al la plenumo de la Kvin Reguloj ni dediĉas tiun lokon.
Al la praktiko de la meditado ni dediĉas tiun lokon.
Al la disvolvo de la saĝo ni dediĉas tiun lokon.
Al la atingo de la Vekiĝo ni dediĉas tiun lokon.

Kvankam ĉe la mondo estas konflikto, tie ĉi estu paco.
Kvankam ĉe la mondo estas malamo, tie ĉi estu amo.
Kvankam ĉe la mondo estas sufero, tie ĉi estu gajeco.

Nek al la recito de Sanktaj Skribaĵoj,
nek al la aspergado per benata akvo,
sed al niaj propraj strebĉoj cele al la Vekiĝo,
ni dediĉas tiun lokon.

Ĉirkaŭ tiu mandalo, tiu santega ejo,
sin malfermu la lotusaj florfolioj de pureco.
Ĉirkaŭ tiu mandalo, tiu santega ejo,
etendiĝu la vaĝro-muroj de la decidemo.
Ĉirkaŭ tiu mandalo, tiu santega ejo,
ekflamu la fajro, kiu aliigas la Sansaron al Nirvano.

Tie ĉi sidiĝante, tie ĉi praktikante,
aliiĝu nia menso al Budho,
aliiĝu nia penso al Dharmo,
aliiĝu nia interkomunikado al Sangho.

Cele al la feliĉo de ĉiuj estaĵoj,
cele al la profito de ĉiuj estaĵoj,
per korpo, parolo kaj menso,
ni dediĉas tiun lokon.